

# ESPERANTO EN MARCHÉ

## BENELUKSA KONGRESO 2023 EN BOUILLON

**Revue trimestrielle belge**

**AUTOMNE HIVER 2023 - N°3-4**

**ni faris**

VESPA PIKNIKO

BENELUKSA KONGRESO

**ni faras**

KURSOJ EN HUY KAJ LIEÛ

**ni faros**

EŬROPA KONGRESO DE ESPERANTO

# Informations Informoj

L'asbl Espéranto Wallonie (anciennement APE) a pour objet la diffusion de l'espéranto, langue auxiliaire internationale, conçue dans le but de faciliter la communication entre locuteurs de langues maternelles différentes.

La V.Esp-o (Espéranto Wallonie) agit en Wallonie directement ou en soutenant les groupes locaux, les tables de conversation et toute initiative individuelle, avec le support de la FWB.

Ses principales activités sont l'organisation d'événements et de formations, la participation à des festivals, le support des Verdaj Skoltoj, des groupes locaux et des tables de conversation.

## Comment soutenir nos actions ?

- Participez à nos événements
- Contribuez à cette revue
- Rejoignez notre équipe
- Devenez membre
- Offrez-nous un café via un don mensuel de 3 € ou plus sur notre compte avec la mention « don »

Avec le soutien de



**FÉDÉRATION**  
WALLONIE-BRUXELLES

## Devenir membre / Membriĝi

**MEM** (membre > 25 ans + revue) 25 €

**JUN** (membre < 25 ans + revue) 12 €

**FAM** (cohabitant pas de revue) 5 €

**REV** (abonnement revue seule) 12 €

À payer sur le compte d'Espéranto Wallonie

**BE33 5230 8132 1946** avec les mentions correspondantes. Voir sur le site

[www.esperanto-wallonie.be](http://www.esperanto-wallonie.be)

E-mail : [esperanto.wallonie@gmail.com](mailto:esperanto.wallonie@gmail.com)

## Nos partenaires / Niaj partneroj

- International : Universala Esperanto Asocio (UEA) Rotterdam et SAT (Paris). Point de contact, Claude GLADY : 071 644 916 [cglady@arcadis.be](mailto:cglady@arcadis.be)
- Belgique : Belga Esperantista Federacio (BEF). La coupole du mouvement. [www.esperanto.be/bef](http://www.esperanto.be/bef) Kristin TYTGAT: 03 322 80 70 [kristin.tytgat@skynet.be](mailto:kristin.tytgat@skynet.be)
- Flandre : Flandra Esperanto-Ligo (FEL) 03 234 34 00 [www.esperanto.be](http://www.esperanto.be) [info@fel.esperanto.be](mailto:info@fel.esperanto.be)
- Bruxelles : Esperantista Brusela Grupo (EBG). Nikolao de BUYL : [nikolao@esperantobruselo.org](mailto:nikolao@esperantobruselo.org) 0478 382 981 [www.esperantobruselo.org](http://www.esperantobruselo.org)
- Verviers (Senlime) : Jean-Marie JACQUES 087 330 292 [jacques@senlime.org](mailto:jacques@senlime.org)
- Jeunes : Verdaj Skoltoj, asbl. Scoutisme sans frontières en espéranto. [info@verdajskoltoj.net](mailto:info@verdajskoltoj.net) Valère DOUMONT 0485 517 552 [www.verdajskoltoj.net](http://www.verdajskoltoj.net)

*La foton sur la kovrilo faris Paul KERRIS dum la Beneluksa Kongreso 2023 en Bouillon.*

## Contenu / Enhavo

Raporto UK en Torino - 4  
Immigration - 7  
Novaĵoj el Esperantujo - 9  
4-a Virtuala Kongreso - 10  
Beneluksa Kongreso - 12  
Kotizoj - 14  
AG kaj Vespa Pikniko - 15  
Ni iomete cerbumu! - 16  
Esperanto-arkivo - 18  
Eŭropa Kongreso - 19

## Colofon / Kolofono

Ce magazine est édité  
par l'asbl Espéranto  
Wallonie - Rue de la  
Terre Franche, 33 -  
5310 Longchamps.  
Rédacteur en chef :  
Jean Annet  
Rédaction et mise en  
page : Yves Nevelsteen  
Imprimé par Lebrun  
Communications à Strée



# Éditorial Antaŭparolo

## Saluton al ĉiuj

Ce numéro de décembre constitue en fait un double numéro, car celui de septembre a été remplacé par le livre du congrès du Bénélux (voir p. 12-13).

Plusieurs congrès ont eu lieu d'ailleurs auxquels nous avons participé, celui de Turin (p. 4-8), le *Virtuala Kongreso* (p. 10-11) et nous vous proposons également à participer au congrès européen à Strasbourg en mai prochain (p.19).

Le congrès du Bénélux à été un vrai succès, nous avons eu un temps superbe et plus de 70 personnes y ont participé. Vous pouvez voir toutes les photos sur : <https://mallonge.net/fotaro-BNLK2023>

Comme chaque année nous vous invitons à renouveler votre cotisation (p. 14). Enfin, en cette fin d'année, je voudrais, au nom de toute l'équipe de la V.Esp-o, vous souhaiter beaucoup de paix et de douceur dans ce monde de plus en plus déséquilibré. La seule manière d'échapper à cette furie extérieure est de renforcer notre sécurité intérieure et de faire appel à tout ce que l'espérantisme suggère ; la paix, le respect de l'autre, l'égalité, la fraternité.

Bonne et heureuse année 2024 !

Jean ANNET

# Le congrès universel à Turin

## Raporto de du belgaj UK-partoprenintoj

Por mi, la Universala Kongreso de 2023 estis mia unua kongreso. Mi estis fascinita de la eksterordinara dimensio de ĉi tiu speco de kongreso. Ne estis renkontiĝo kiel tiuj, kiujn ni kutime organizas, nur pli granda. Ne. Estis kiel enkonduki la kvaran dimension. Kaj eĉ kvinan! Mi estas konvinkita, ke tiu sperto povas doni impulson al ĉiuj niaj renkontiĝoj ekde nun, kaj kiel ni jam spertis dum la 10-a PEKO renkontiĝo (2023) kun la ĉina grupo. Mi klarigas.

Multaj homoj el ĉie kontribuis por fari de ĉi tiu kongreso novan paŝon al la movado sed ankaŭ por la transiro al novaj turismaj praktikoj. La oficiala temo estis migrado. Ĉiuj migradoj, ankoraŭ turisma migrado. En ĉi tiu reĝa (Victor Emmanuel III) kaj industria urbo (Fiat) sur la rivero Pô, apud la Apeninaj montoj, ni faris interesajn gvidatajn vizitojn bicikle kaj piede. Kelkaj iris bicikle, kiel Toon el Bruĝo, trajne aŭ aŭte. Aliaj iris per aviadilo, ne sen streĉo aŭ sento de kulpo pri la klimataj defioj. Alia grava temo estis la Esperanta kulturo: provu neniam ofendi iun proksimiĝante, ne fari delikatajn ŝercojn, ne vestiĝi maldece, ktp. Kompreneble oni festis la prapatrojn, kaj ankaŭ ĉiujn, kiuj dum sia tuta vivo kontribuis al esceptaj projektoj, kiel La Espero en Brazilo. Multaj homoj estis honoritaj.

Mi observis ke ĉiuj generacioj estis reprezentitaj, ke pluraj junaj muzikistoj ludis kune kun respekto kaj plezuro, kaj ke la danco estis ĉie. Ĉiuj partoprenis laŭ sia maniero, ankaŭ maljunuloj kaj handikapitaj en rulseĝoj. Granda delegacio de blinduloj integriĝis, kaj ni lernis utile akompani ilin se utile. Tio ankaŭ interesis min.

Estis ankaŭ konkurso de bobelartoj surloke – kaj oni jam ricevis eldonon de la finalistaj noveloj en la kongressako –, sed ankaŭ altnivela scienca programo (matematiko, astronomio, ktp) kaj ĉiutage renkontiĝoj pri la edukado en la tuta mondo. Sed ne nur. Estis ankoraŭ prelego kaj speciala spaco por prezenti la kutimojn de la protektitaj etnoj en Ĉinio, ekzemple.

Grava loko estis ankaŭ donita al Afriko, kompreneble, kun kora invito por kuraĝigi nin iri al la Kongreso 2024 en Aruŝa (Tanzanio). Persone, mi intencas iri, kaj mi ŝatus, ke vi partoprenu la vojaĝon! Pri ĝi mi baldaŭ parolos en estonta bulteno.

La belga delegacio havis ĉirkaŭ kvardek ĉeestantojn el la diversaj regionoj. Ni renkontis tie Justin, kiu doktoriĝas pri matematiko en Louvain-la-Neuve, kaj lernis Esperanton per Duolingo. Bonvenon Justin. Abel, el Togolando, kiu loĝas en





Bruĝo, koncertis kun granda sukceso kaj trovis sian lokon inter la muzikistoj: ankaŭ li estis sur la scenejo dum la balo kaj akompanis konatajn artistojn, inkluzive dum la nacia vespero. Ni povas esti fieraj pri liaj agadoj dum la Kongreso. Aliaj belgoj ankaŭ partoprenis en la KER ekzamenoj C1 kaj B2. Mi ne donas nomojn ĉar ni ankoraŭ ne scias kiuj sukcesis!

Vi bone komprenis, ke la etoso estis tiel agrabla ke tio ne povas esti priskribita per simplaj vortoj. Kiam oni renkontis ne konitajn kongresanojn portante la ŝildon de la kongreso sur la vojo, en la tramo, sur la buso, en la parkoj, ni parolis aŭ ridetis kune pri la antaŭaj aŭ sekvaj agadoj, la bela vivo en Italio, la mirindaj muzeoj, aŭ utilaj informoj. Kelkfoje homoj demandis kian lingvon ni parolis, ĉar ŝajnas, ke tie Esperanto ne estas konata, kiel ĉi tie! Kelkfoje, tio estis tiel komedia la komplikaĵo nur pro mendi lokan bieron per loka lingvo en loka kafejo!

*Marie DROOG*

Sep belgoj elektis vojaĝi kune: Jean Annet kun sia edzino, Eric Nemes kun sia edzino, An Olijslagers, Marilyn Droog, Eliane Pironnet. Malgraŭ la ĝenerala striko anoncita de Ryanair, kiu kaŭzis al ni multe da streso, la aviadilo finfine ekflugis laŭplane. La grupo loĝis en bela hotelo kun klimatizilo kaj matenmanĝo sur teraso. Tiu ĉi hotelo troviĝis proksime de tramhaltejo kun linio al la Politeknika Universitato, kie okazis la Kongreso.

Tiel, en Torino, mi spertis mian unuan Universalan

Kongreson. Grandioza evento! La programo estis tre interesa, la proponoj sekvantaj unu la alian freneze: prelegoj, kursoj, spektakloj, ludoj, ekskursoj, kaj multe pli. Aldonu aliajn agadojn kiel transiri longajn koridorojn, iri de ĉambro al ĉambro, renkonti tiom da homoj, serĉi kie manĝi tagmeze kaj vespere, kaj vi komprenos, ke ĉio ĉi preskaŭ kapturis min. Do, pri ĉi tiu giganta renkontiĝo, mi nur mencios miajn plej kortuŝajn momentojn.

La unuan tagon dum vespermanĝo en apuda strato, mi vidis tra la fenestro, esperantistoj promeni sur la strato surhavante malgrandan ŝildeton kiu ŝajnis diri al mi: ni apartenas al via mondo, ni parolas la saman lingvon: Esperanto! Tio estis preskaŭ antaŭsento, kiel vizio de la estonteco, ĉar ĉirkaŭ mi nur regis la itala lingvo. Sidi sur benko apud homoj el aliaj landoj estis ankoraŭ bela momento. Mi rapide komprenis, kiel facile estis interparoli, interŝanĝi niajn impresojn kaj ideojn pri multaj temoj. Mi ekvidis ankaŭ plurajn famajn homojn, kies ĉeesto tre diskrete miksiĝis en la homamason; ĉi tiu konduto agrable surprizis min.

Konklude, kvankam la kongreso estas tutmonda evento, mi memoros tiun ĉi simplan kaj naturan rilaton inter Esperanto-parolantoj, sendepende de raso aŭ kulturo. Ĉi tiu sento estis mirinda malkovro por mi.

*Eliane PIRONNET*

# Immigration: confluence de valeurs humaines

## Nous sommes tous des enfants d'immigrés

Selon l'UNHCR\*, on estimait à 281 millions le nombre de migrants dans le monde en 2020, soit 3,6 % de la population mondiale. Selon les estimations, ce chiffre a augmenté au cours des 50 dernières années (128 millions de plus qu'en 1990 et plus de trois fois plus qu'en 1970). Mais en % de la population, ce nombre de migrants n'est, semble-t-il, pas plus important que lors de la grande vague liée à l'industrialisation internationale et à la première guerre mondiale. En 2022, le nombre de réfugiés dans le monde (ou migrants involontaires) a pour la première fois dépassé les 100 millions selon les statistiques de l'UNHCR.

Les 1318 participants au 108e Congrès universel d'Esperanto réunis à Turin début août 2023 ont traité de l'immigration. Provenant de 69 pays différents, ils ont pu non seulement discuter le thème, mais l'expérimenter et le vivre car tous parlaient la langue internationale esperanto\*, sans qu'aucune barrière linguistique ne vienne empêcher une communication directe. Les débats ont porté sur les ONG turinoises, le changement climatique, les guerres et la misère, la biologie et la cartographie des migrations, les difficultés des migrants pour s'intégrer. De nombreux



espérantistes ont rapporté leurs propres expériences de migrants et/ou d'accueillants. Ils ont souligné que la connaissance de l'esperanto aide au début, mais qu'il est essentiel d'apprendre la langue du pays d'accueil pour s'y intégrer.

Malgré les difficultés actuelles au niveau national et européen, Turin continue à manifester ses valeurs de solidarité en concrétisant des expériences d'accueil et d'intégration.



D'un point de vue biologique, les migrations sont essentielles à l'évolution. Mais tandis que l'homo sapiens que nous sommes continue d'évoluer, nos comportements sociaux, nos émotions sont toujours calibrées sur les temps préhistoriques. L'éducation permet néanmoins parfois de modifier les comportements.

Parmi les témoignages, un Pakistanais immigré en Italie en 1998 a montré comment de petit boulot en petit boulot, restaurateur, agent de tourisme, homéopathe, il est aujourd'hui intégré à la vie politique de Padoue.

Un médecin suisse, "référént" depuis 23 ans dans un centre pour réfugiés, a parlé de ses efforts (vains) pour que les migrants utilisent l'espéranto, mais aussi de solutions partielles qu'il a trouvées aux difficultés sanitaires de "ses" malades. Sa connaissance de 6 langues européennes lui a moins servi que les interprétations d'une aidante originaire de Bagdad qui pouvait traduire de l'arabe en anglais et inversement. Enfin, il a utilisé un outil développé par l'association des médecins espérantistes, <http://umea.fontoj.net/>, qui décrit 270 pathologies en dessin avec traduction dans 20 langues différentes. Mais la communication reste très difficile, surtout lorsqu'on est face à des personnes qui ont été persécutées, torturées, ou simplement dont la relation au corps et au médecin diffère de la nôtre. Après une semaine d'échanges, le Congrès s'est conclu sur une résolution dont voici les grandes lignes (texte intégral sur le site).

1. **La société civile de la ville hôte de Turin est un exemple pour l'intégration des migrants.**
2. **Le nombre de réfugiés dans le monde a dépassé 100 millions et va nécessairement augmenter vu le changement climatique.**
3. **Les congressistes appellent tous les États du monde à stopper les causes de migration involontaire et soutiennent les efforts pour atténuer, sinon résoudre, les problèmes.**
4. **Ils appellent les États où arrivent les réfugiés à leur apporter le soutien nécessaire pour qu'ils puissent mener une vie indépendante et libre. La migration enrichit la culture et rend la société plus prospère.**
5. **Ils appellent les États à appliquer la Déclaration universelle des droits de l'homme proclamée en 1948.**
6. **Ce qui est loin d'être le cas.**
7. **Ils soulignent que les droits humains sont universels.**

1. OIM ONIU Migration État de la migration dans monde 2022 p 28
2. Voir Les migrations internationales à l'ère de la mondialisation industrielle, 1840-1940, Adam McKeown, Dans Le Mouvement Social 2012/4 (n° 241), pages 31 à 46 Éditions La Découverte.
3. <http://umea.fontoj.net/>



# Le monde de l'espéranto

## Novaĵoj el Esperantujo

### Grégoire MAERTENS 100-jariĝos

100-jariĝos en januaro 2024 la fama belga esperantisto Grégoire MAERTENS. S-ro MAERTENS laboris kiel estrarano de UEA de 1977 ĝis 1989. De 1980 ĝis 1986 li estis ĝia prezidanto. MAERTENS estas kunfondinto de Flandra Esperanto-Ligo, estis ĝia estrarano pri financo kaj konstanta konsilanto. La redakcio de la flandra revuo Horizon-taal dediĉis sian numeron 323 (nov-dec 2023) al s-ro MAERTENS. Jen bona kialo ekkoni ĉi tiun revuon? Vidu ankaŭ [https://eo.wikipedia.org/wiki/Grégoire\\_Maertens](https://eo.wikipedia.org/wiki/Grégoire_Maertens)



### Oficialigo de vortoj fare de la Akademio de Esperanto

La Akademio de Esperanto en pasinta oktobro oficialigis 420 novajn radikojn. Kiel kutime, la nun oficiale aprobitaj vortoj estas vaste uzataj jam de multaj jaroj. Grandparte temas pri nomoj de landoj, popoloj kaj urboj. Oficialaj estas nun Finnlando, Barato kaj Moskvo.

La Oficialaj Aldonoj estas maniero de la Akademio de Esperanto normigi la vortprovizon de Esperanto. Tre malofte oni maloficialigas vortojn, sed evidente ne ĉiuj malnovaj oficialaj vortoj plu estas uzataj. Ekzemple velocipedo, oficialigita en la 1-a aldono en 1909, nun kutime estas nomata biciklo. La Universala Vortaro estas parto de la Fundamento de Esperanto, aprobita dum la unua Universala Kongreso de Esperanto en Bulonjo en 1905. Tiu vortaro enhavas, krom la 900 vortoj de la Unua Libro, pliajn 1 740 vortojn, kolektitajn de Zamenhof el verkoj aperintaj inter 1887 kaj 1894. La vortoj estas difinitaj ne en Esperanto, sed per tradukoj al kvin aliaj lingvoj. En la 1-a Oficiala Aldono, aprobita de la Akademio en 1909, krom *velocipedo* aperis ekzemple *absurda*, *banko*, *ebria* kaj *imposto*. En la 9-a Oficiala Aldono de 2007 aperis *aidoso*, *radaro* kaj *saksofono*. Detaloj aperas en <https://mallonge.net/akademio23>

# Lors du 4ième Congres Virtuel

## Dum la 4-a Virtuala Kongreso

La Virtuala Kongreso (VK) estas formo de Universala Kongreso, okazigita per retaj metodoj ekde 2020, pro la neceso nuligi ĉeestajn renkontojn pro la tutmonda pandemio pro kovimo (Covid-19). La VK ofertas virtualan aliron al esencaj programeroj de UK kaj donas okazon por enkonduko de novaj ideoj. La VK estas senpaga por individuaj membroj de Universala Esperanto-Asocio. Ankaŭ ne-membroj de UEA povas partopreni, sed kontraŭ simbola kotizo. VK utiligos teknikajn avantaĝojn por strebi rekrei la etoson de UK, kiel libera babilejo, renkontiĝaj ĉambroj, disdividiĝo en malgrandajn diskutgrupojn kaj menuon de prelegoj. La 4-a Virtuala kongreso okazis de la 23-a ĝis 26-a de novembro 2023. La temo estis “Enmigrado – kunfluo de homaj valoroj”.

Dum la 4a Virtuala Kongreso (VK) de UEA, inter la multaj spektakloj estis la prezento (videaĵo de 30’’) de interesa ĉina projekto: rakontoj pri bestoj el diversaj landoj.

La ĉina kalendaro estas ligita al bestoj. Ĉiu jaro havas sian beston « patronon » la esperanta asocio de Tianjin (TEA) lanĉis la projekton ekde 2020: Laŭjare kolekti diverslandajn prezentaĵojn pri la bestoj, ĉinigi ilin kaj publikigi.



Ekde tri jaroj, TEA ricevis 45 artikolojn, 25 voĉlegaĵojn, 9 videaĵojn, nur 3 kantojn :-), el 16 landoj de 3 kontinentoj,

kaj multege (miloj :-)) da pentraĵoj, desegnoj el... Bosnio-Hercegovino.

Dank' al tiu projekto la ĉina publiko povas ĝui elstaran literaturan verkon kaj ankau la kulturen diversecon de nia mondo.

Ekzemple por la jaro de la bovo (2021), oni lernas pri tradicio en Brazilo. Bovo ludas gravan rolon en la brazila folkloro, estas folkloraj grupoj kiuj teatrumas pri historietoj kun bovoj.

Por la jaro de la kuniklo (2023), estis rakontita la ilustrita libreto de fama slovaka verkisto ; destinata al infanoj kaj ankau al plenkreskuloj pro tiu profunda senso (respekto de la alieco).

Bedaŭrinde ne eblas dum tiu prezento, resumo (30') ĝui la talenton de tiuj multaj kontribuantoj !!

Mi esperas ke restos spuroj de tiuj verkoj sur la reto...

Ankaŭ ni povus partopreni por la jaro de drako (2024)kaj sendi ion interesan pri « la drako DOUDOU de Mons » ekzemple!?

TEA : [tea\\_esperanto@hotmail.com](mailto:tea_esperanto@hotmail.com)  
Catherine ROYAUX

## Ĉu vi konas la revuon Esperanto de UEA?

Esperanto estas revuo kaj la precipa publikigaĵo de la Esperanto-movado kaj la oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio. Ĝi aperadas ekde 1905, kun interrompoj en 1914/15 kaj 1941/42-46/47. Ĉefredaktoroj ekde aprilo 2017 estas Dima Ŝevĉenko kaj Anna Striganova en Rusio. Ĝi estas la plej legata Esperanto-revuo en la mondo.

Membroj de UEA senpage ricevas la bitversion de Revuo Esperanto; la paperan version eblas aboni. Sed ekzistas ankaŭ tute libere alirebla retejo <https://revuoesperanto.org>. Tie vi povas ekzemple senpage elŭti elstaran libron de Mark Fettes - Ne estas fido nur - kaj la ses numerojn de **Migranta Hirundo**, la revuo de la ĵus pasinta Virtuala Kongreso. Bonan malkovradon!



# Congrès du Benelux à Bouillon

## Beneluksa Kongreso en Bouillon

Ĉi-jare la scenejo por la Beneluksa Kongreso estis Bouillon, en la koro de la Ardenoj. Tute alia pejzaĝo ol la “ebena” lando de leper kie la BNLK gastis en 2022.

Kongresejo estis la junulargastejo de Bouillon, belege situita sur la kresto de la suda valflanko kun mirinda panoramo sur la Semois kaj la faman kastelon. Agrabla bela indiĝena somero igis la ejon/kongreson ankoraŭ des pli ĝuinda.

Ĉi-foje estis vere beneluksa kongreso ĉar ĉiuj tri landoj estis reprezentitaj, eĉ delegacio el Luksemburgio ĉeestis. La – por flandroj – ekzotika situo tre verŝajne klarigas ke flandroj estis grandnombre reprezentitaj.

La organizantoj preparis interesan programon konsistantan el la tradiciaj ingrediencoj sed ankaŭ novaj.

Mi aparte aprezis la enkondukon al la ludo “pordopilko” [angle Gateball]. La organizantoj ekhavis la ideon dank’ al komencanto Pierre-Yves kiu ludas pordopilkon. Miaopinie tiaj – en Esperantujo ne kutimaj – aktivecoj povas allogi alian publikon kiu ne tro interesiĝas pri “intelektulaj” aferoj. Estas aparte interese ĉar la filozofio de la promociantoj de la ludo kiu nun jam estas tre populara en Azio iel kongruas al tiu de Esperanto: oni volas

kunigi homojn trans landlimojn. Kaj krom tio estas ludo ludebla por ĉiuj aĝoj kaj genroj. Sylvain Lelarge lerte interpretis dum la enkonduko, kiun la partoprenantoj evidente ĝuis.

Mi ankaŭ ĝuis la ĉarman muzeeton/fabrikon de la fama Semois-tabako en Corbion. La estro suke priskribis kiel senmone kaj sen ia scio pri la fabrikado li komencis la muzeon kaj iomete la fabrikadon de la unika Semois-tabako antaŭ dekoj da jaroj.





Post longa baraktado kaj kun kelke da bonŝancoj li sukcesis vendigi la tabakon. Nuntempe estas eta entrepreno kaj la estro povas apenaŭ sekvi la mendojn de pakedoj de tiu unika tabako inter alie el Usono kaj Japanio.

En Corbion ankaŭ troviĝas la “Domo de Mateo”, kiun Alex Humet kaj Ite Tytgat estas konstruantaj honore al sia forpasinta filo. La domo devus gastigi homojn kiuj spertas psikajn malfacilaĵojn kaj, ĉar Mateo estis juna aktiva esperantisto, la domo estu ankaŭ malfermita al junaj movadanoj en internacia mojosa etoso.

Aparte bonvenaj estis Katalin Kovats kaj Sylvain Lelarge kiuj en sia kutima maniero lerte kaj amuze prizorgis interesan leciono-programon. Ili kaptis la okazon disdoni la KER-atestilojn al la ĉeestantaj laŭreatoj de freŝdataj ekzamenoj.

Mia plej ŝatata vespera programo estis la koncerto de Armel Amiot. Mi jam ĉeestis retan koncerton de li sed fizike ĉeesti ĝin estis centfoje pli bone. Nur helpe de sia banĝo (kaj virtualaj muzikistoj) li prezentis tre aŭdindan aron da kantoj, ne nur en Esperanto sed ankaŭ en la franca kaj suka kreol-franca. Li gajnis la simpation de la publiko, kaj la ĉeesto de kelkaj kunkantantaj junuloj aldonis spicon al la tuto.

Aparte menciinda estas prelego de flandro Paul De Cooman – lia unua prelego – pri la (historio de la) publika transporto en Bouillon. Li faris ĝin senriproĉe. Bela ekzemplo de kunlaboro trans lingvaj limoj.



Mi ankaŭ ŝatis la bone organizitan, “trans-lingvaj-limoj”-n atelieron “La fortoj kaj malfortoj de la tri Esperantaj belgaj asocioj por la estonteco”.

Krome nepre menciindas programeroj kiujn mi ne ĉeestis: vizito al Archéoscope, interaga muzeo kie oni bildriĉe prezentas la historion de Bouillon, (kompreneble) vizito al la fama fortikigita kastelo (kun rabobirda spektaklo), diversaj prelegoj, promenoj, ateliero de makrameo, biergustumado (la ardenaj bieroj tre plaĉis!). Abunda programo el kiu oni foje malfacile povis elekti.

Kvankam la meza aĝo de la partoprenantaro estis – ne surprize – alta, tamen ĉeestis kelkaj mezaĝuloj kaj eĉ junuloj, kiuj montriĝis tre kontentaj pri sia partopreno.

Resume, mi tre ĝuis la kongreson kaj mi jam sopiras al la BNLK 2024 en Limburgo.

*Piet GLORIEUX*

Komuna fotaro: <https://mallonge.net/fotaro-BNLK2023>

# Cotisations

## Kotizoj

### COTISATIONS POUR « ESPÉRANTO WALLONIE (V.Esp-o) » EN 2024

- MEM : 25 € pour être membre adulte de V.Esp-o et recevoir la nouvelle revue.
- JUN : 12 € pour les membres de moins de 25 ans pour les mêmes services.
- FAM : 5 € pour les membres de la famille, en soutien, sans recevoir la revue.
- REV : 15 € pour ne recevoir que la revue, sans être membre.

**VIREMENT AU COMPTE IBAN : BE33 5230 8132 1946 de Triodos**

de l'asbl « ESPÉRANTO-WALLONIE (V.Esp-o) »

**NB : Indiquez les raisons du versement. Exemple : MEM+3xFAM = 40 €.**

\*\*\*\*\*

**Pour soutenir nos actions, vous pouvez faire un don (exceptionnel ou régulier) à V.Esp-o.**

**Ou participer au FONDS INSTIGO : Compte BE25 9731 2584 2982 des « Verdaj Skoltoj ».**

**Vous pouvez aussi vous abonner à la revue "ESPÉRANTO-INFO" en versant 30 €, au compte IBAN : FR91 2004 1 01 0 081 1 901 4 6B02 947 BIC : PSSTFRPPMAR.**

**Ou bien, éventuellement, au compte de V.Esp-o qui transmettra la demande**

# Assemblée générale et Vespa Pikniko

Le 3 septembre, nous avons eu notre traditionnel "Vespa pikniko" avec une quinzaine de membres. Comme les années précédentes, ce fut l'occasion d'une rencontre conviviale et agréable. RDV l'an prochain pour une peut-être nouvelle formule.

Ce 3 septembre au matin, nous avons eu également notre Assemblée Générale.

Nous avons d'abord accueilli comme nouveau membre effectif Philippe Draize, qui s'occupe de l'organisation des cours à HUY.

En outre, nous avons eu le rapport moral avec nos activités de l'année ; participation au festival 'LaSemo', ouverture d'un nouveau cours d'Espéranto à HUY, édition de la revue 'Espéranto en Marche' et surtout préparation du Beneluxsa Kongreso de fin septembre 2023. Les associations de Charleroi et de Liège ont également fait part de leurs activités.

Claude Gladys, le trésorier a présenté les comptes. Cette année nous avons un léger bénéfice de  $\pm 100$  €.

Les rentrées viennent surtout des cotisations et des subventions de la Fédération Walonnie Bruxelles.

Nous avons eu quelques nouveaux membres et nous nous en réjouissons. Toutes ces nouvelles cotisations nous permettent de mettre en équilibre nos dépenses.

Enfin, nous avons pris un peu de temps pour dégager quelques pistes prioritaires pour l'année suivante. Cette réflexion est toujours en cours...



# Ni iomete cerbumu!

En fama televida ludo en FR3, «Ciferoj kaj literoj» (en la franca: des chiffres et des lettres), kiam temas nur pri « ciferoj » (ne pri literoj), necesas solvi la jenan problemon: Se ni ricevas triciferan nombron N (inter 100 kaj 999), kaj 6 pli malgrandajn nombrojn (a,b,c,d,e,f), hazarde elektitaj inter la 10 ciferoj (1, 2, 3, 4, 5, 6, 7, 8, 9, 0), kaj la nombroj 10, 25, 50, 75 kaj 100, **la problemo estas**: Kiel obteni iun nombron kiu plej alproksimiĝas la N, uzante nur la 4 bazajn operaciojn (adicio, subtraho, multipliko kaj divido) kun la 6 malgrandaj nombroj? Ekzemple : N = 246 kaj a=5, b=10, c=2, d=2, e=6, f=8 ? [Vidu sube la solvon !]

Tiu problemo, ni prezentos laŭ la formala formo **[N, (a,b,c,d,e,f)]** ! Do : [246, (5,10,2,2,6,8)] !

Por sukcesi, evidente necesas bone scipovi la normalajn kalkulregulojn kaj ĝisfunde la multiplikajn tabelojn, almenaŭ ĝis 10. Ankaŭ helpas la kono de kriterioj pri divideblecoj,

En kelkaj problemoj, N ne estas hazarde proponita, sed estas rekte ligita al la 6 nombroj.

Tiukaze, ĉiam ekzistas almenaŭ unu solvo, kaj do ni scias kion ni devas fine obteni, tio estas N!

Ni komencu per facila problemo: [113, (100,5,8,10,1,3)] ? Ni povas tuj solvi, uzante nur adiciojn :

(100 + 5 = 105) kaj poste (105 + 8 = **113**) ! Kion ni devis trovi [KNDT]

Jen alia facila kalkulo: [134, (5, 2 ,50, 2, 1, 3)]? Evidente ni sufiĉe facile trovas solvon:

(2 x 50 = 100) ; (100 + 25 = 125) ; (2 + 1 = 3) ; (3 x 3 = 9) ; (125 + 9 = **134**). [KNDT]

Ĉi-tie, ni nur uzis 2 operaciojn (multipliko kaj adicio) kaj ĉiujn malgrandajn nombrojn.

Sed povas okazi ke ni vere bezonas la 4 operaciojn sed ne ĉiujn malgrandajn nombrojn.

Ekzemple : [147, (75, 2 , 7, 4 , 4, 6)] ? Solvo: (2x75 =150);(150-7=143);(143+3 =146);(4/4 =1),

kaj finfine (146 +1=**147**). [KNDT]. (Ĉi-foje, ni ne uzis la nombron 6, sed ja la 4 operaciojn). Kiam ni tuj rekonas kelkajn divizorojn de N, tio evidente faciligas la serĉon:

En [690, (3,25,2,5,2,4)], ni tuj vidas ke 690 havas la divizoron 30 ĉar 690/30 = 23 !

Facila solvo estas do : (2\*5 = 10) => (10\*3 = 30) => (25-2 = 23) => (23\*30 = **690**). [KNDT]





Evidente, se N estas hazarde proponita, povas okazi ke ni ne sukcesos trovi ĝustan solvon kaj ni nur kapablos plej alproksimiĝi N. Tio evidente malfaciligas la serĉon de la solvo.

Jen ekzemplo:

[**407**, (75,4,25,1,1,3)] ? => (75+25=100) (100x4=400) (1+1=2) (2x3=6) (400+6=**406**). Mankas 1!!

Kelkfoje ni eĉ ne kapablas vere alproksimiĝi N: Tio alvenas kiam N estas granda kaj kiam la 6 nombroj estas vere malgrandaj. Por [985,(1,2,9,2,4,1)], ne eblas vere alproksimiĝi! La plej granda nombro kiun ni povas atingi estas ĉi-tie 288, en la plej favora kazo!!

Efektive : (1+1=2) ; (2+2=4) ; (2x4=8) ; (9x4=36) ; (8x36=288)!

Precioza helpo estas la kono de la divizoraj kriterioj kaj scii ĉu

N estas dividebla per iu nombro. Ekzemple, N estas dividebla per 2 si N estas para, kaj N estas dividebla per 9 se la sumo de la ciferoj de N estas 9,18 ou 27. N estas dividebla per 5 se la lasta cifero de N estas 0 aŭ 5!

Se ni scias ke 689 havas 13 kiel divizoro, ni povas plej rapide solvi la sekvan problemon: [689, (25,2,4,10,1,3)] => (25x2=50) ; (50+4=54) ; (54-1= 53) ; (53x(10+3))=**689**) ! [KNDT].

Alia ekzemplo : [759, (7,3,25,2,4,1)]? kaj supozu ke ni scias (estas eble se ni konas la dividibelecajn kriteriojn) ke 759 estas dividebla per 3, 11 kaj 23! (Tri primnombroj !)

Jen rapida solvo : (7+4=11) ; (25-2=23) ; (11x23=253) ; (253x3,=**759**) !

BN : En alia artikolo, mi intencos montri la divideblecajn kriteriojn por prim-nombroj ĝis 31!

Jen la solvo por [246,(5,10,2,2,6,8)]?

Povas esti ((( (6-2)x10)+8)x5)+6) = **246** ! [KNDT].

Nun kelkaj ekzercoj por vi ! (Ĉi-tie estas ĉiam solvo, do N ne estas hazarde proponita) :

- 1) [455, (10,75,5,100,1,10)] ?
- 2) [101, (3,2,10,5,6,3)] ?
- 3) [575, (75,1,2,2,5,25)] ?
- 4) [860, (100,4,8,2,5,3)] ?
- 5) [928, (6,4,5,8,2,1)] ?

*Claude GLADY*

# Archive internationale espéranto

## La Internacia Esperanto-arkivo bezonas vin

Il y avait deux collections existantes en Belgique, dont l'avenir était menacé à terme :

- une partie du Fonds César Vanbiervliet (Courtrai) et
- la totalité de la collection privée de Marc Vanden Bempt.

Toutes les deux avaient besoin d'une structure juridique plus solide que celles dont elles disposaient jusqu'ici. L'Archive Internationale Esperanto les a reprises toutes les deux. A partir de cette base, elle continue à s'enrichir. Nous sommes en contact avec différentes personnes et instances afin de sauvegarder également leurs archives, si leur existence future est menacée. Si vous cherchez pour vous-même ou pour votre groupe un lieu sûr de conservation pour votre matériel en espéranto, veuillez contacter l'EspA à l'adresse indiquée en bas de page.

### Soutien

L'association sera reconnaissante de tout soutien possible. Nous disposons déjà de quelques 250.000 €, mais il nous faudra encore autant pour l'achat d'un immeuble convenable où l'on puisse assurer la conservation des collections. Vous pouvez aider à

assurer l'avenir de l'EspA en devenant Ami(e) de l'EspA, en achetant des Briques ou en tant que volontaire.

### Voulez-vous apporter votre contribution ?

L'EspA accueille avec reconnaissance toute offre de soutien ainsi que toute réaction ou suggestion.

Marc VANDEN BEMPT  
Internacia Esperanto-Arkivo aspc ([iespa.eu](http://iespa.eu))



V.Esp-o dispose d'une bibliothèque de plus de 1700 livres à Cerfontaine. Elle est visitable sur rendez-vous chez le bibliothécaire Claude Gladly.

Renseignements : [cglady@arcadis.be](mailto:cglady@arcadis.be)

## Rencontres et cours réguliers :

### Charleroi - <https://esperanto.be/charleroi>

Centre Culturel, rue du Château 3 - 6032 Mont-sur-Marchienne. Pour y participer: Michèle Villers [michele.villers@hotmail.com](mailto:michele.villers@hotmail.com)

**Eghezée** Jean Annet - [jean.annet@gmail.com](mailto:jean.annet@gmail.com)  
0495 10 32 30

**Huy** Eliane Pironnet - [epironnet@gmail.com](mailto:epironnet@gmail.com)  
0494 230 234

### Liège - <https://esperanto.be/liege>

Eric Nemes - [eric.nemes@gmail.com](mailto:eric.nemes@gmail.com)  
0494 230 234

### Verviers - <https://esperanto.be/verviers>

Jean-Marie Jacques [jeajacques@voo.be](mailto:jeajacques@voo.be)  
087 33 02 92

## Tables de conversation :

### Liège

Chez « Toutes directions ». Infos : 04 262 20 64 → <https://mallonge.net/td>

### Louvain-la-Neuve

Catherine Royaux [cat.royaux@netcourrier.com](mailto:cat.royaux@netcourrier.com)

# Notez déjà

## Eŭropa Kongreso de Esperanto 2024

La Fédération belge de l'espéranto est le partenaire officiel du congrès européen de l'espéranto à Strasbourg (France) du 8 au 12 mai 2024. Le congrès est co-organisé par les associations françaises, allemandes, belges, suisses et par la fédération internationale des cheminots espérantophones. Rendez-vous sur <https://eventaservo.org/e/EK2024>



## Autres personnes ressources

- Contact presse : Jean-Pol Sparenberg 0475 272 319 [jpsparenberg@brutele.be](mailto:jpsparenberg@brutele.be)
- Jeunes et initiation : Valère Doumont 0485 517 552 [doumontvalere@yahoo.fr](mailto:doumontvalere@yahoo.fr)
- Cerfontaine : Claude Gladly 071 64 49 16 [cglady@arcadis.be](mailto:cglady@arcadis.be)
- Charleroi : Rudy Cogniaux 0492 710 974
- Comines-Warneton : Jean-Claude Thumerelle - [jcthum@gmail.com](mailto:jcthum@gmail.com)
- Plombières : Bernadette Poncelet, [bernadetteponcelet@skynet.be](mailto:bernadetteponcelet@skynet.be)
- Verviers : Jean-Marie Jacques [jeajacques@voo.be](mailto:jeajacques@voo.be)

**Voulez-vous apparaître dans cette liste ?**  
**Contactez-nous !**

# L'espéranto c'est dans la poche

Cette brochure est une bonne base pour commencer à apprendre l'espéranto. Cette langue internationale s'apprend plus facilement que les autres du fait de sa grammaire logique et de son système pratique de construction des mots.


Découvrez d'abord l'espéranto dans la première partie et faites ensuite les exercices de la deuxième partie. À chaque leçon de grammaire correspond un exercice. À raison d'une leçon par jour, vous pourrez au bout d'une semaine comprendre un texte simple et faire quelques phrases.

Découvrez une langue en une semaine



**Recevez cette brochure gratuitement !**

- via notre site : [esperanto-wallonie.be](http://esperanto-wallonie.be)
- communiquez votre adresse à [esperanto.wallonie@gmail.com](mailto:esperanto.wallonie@gmail.com)
- envoyez vos coordonnées par sms au n° de tél : 0485 51 75 52



6540-dépôt  
Lobbès  
P001014

Editeur responsable: Jean ANNET  
V. Esp-o : rue de la Terre Franche, 31 - 5310 Longchamps  
Exp : Jean-Pol Sparenberg  
Ruelle de Thuin, 20 - 6540 Lobbès